

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 17/10/2019 Kvarcentkvardekoka eldono (unua eldono 20/09/2011)



**Rapide ekrigardu ĉiujn titolojn.**

**Legu tiujn kiuj interesas vin**

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#).

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)

Entute **810,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **296,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **280,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **234,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

## Gramatika serio “La Verbo en P.A.G.”. N.ro.90



P.A.G. donas la sekvajn ekzemplojn de “kiel”: Kiel vi fartas? Kiel (= Kiom) alta vi estas? Kiel li kuras! Kiel (= Kiom) bela vi estas! Kiel mi aŭdis, li mortis. Ni ne estas tiel (= tiom) naivaj, kiel (= kiom) pensas pri ni kelkaj personoj.

Rigardu, kiel li kuras! Terure, kiel (= kiom) malsata li estas!

Post tio PAG klarigas la (pro la eŭropaj lingvoj} specialan, sed mallogikan, uzon de “kiel” kiel partikulo por enkonduki komparon, kiel en “Li parolis kiel prezidanto”, kie “kiel” signifas “en la funkcio de”, kaj en “Li estis pala kiel neĝo”, kie “kiel” signifas “en la formo de neĝo”. Aliaj”ki-“-vortoj ne povas uzati en tiu funkcio, bonŝance.

Jen la uzataj pluformadoj: tiela; tiele; iele.

(daŭrigota) **Marcel Leereveld**



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**



## La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm ĝis 12 tagmezo, Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagota kafo atendas vin. La 19a de oktobro estos la tria sabato. Venu **Roger Springer**



## Libroj el Svislando Kvin libroj senpage!

Internacia Fondaĵo pretas senpage donaci (ĝis elĉerpiĝo de la stoko) la kvin sube listitajn librojn - al E-bibliotekoj, kiuj petos ilin. La Fondaĵo mem pagos la sendokostojn.

Interesataj bibliotekoj bonvolu sendi sian precizan adreson al: [19sun@sunrise.ch](mailto:19sun@sunrise.ch)

Omram Mikhael Aivanhiov:

- Gravas ne kion, sed kiel ni manĝas (eldonita en 1992)
- Kiel plibonigi la rilatojn inter viro kaj virino (eldonita en 1991)
- Vera paco komenciĝas nur, kiam ni instalas ĝin ene de ni mem (eldonita en 1995)
- Kapabli transformi okazaĵon, anstataŭ pasive travivi ĝin suferante (eldonita en 2002)
- Respondoj al multaj el niaj demandoj (eldonita en 2015).



La unuajn 4 titolojn tradukis esperanten Claude Piron. Amike, **Katja Steele**



**(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)**

## Ne kreskas aneto en mia ĝardeno.

**ANETO ESTAS ANGLE "DILL" ("Anethum graveolens").**

En Aŭstralio mi kelkfoje aŭdis unu personon diri al alia persono "You dill!" kun la signifo "You imbecile!". Mi do pensis ke tio estas konata brita mallaŭdaĵo. Kaj tial, en la pasinta numero de A.E., mi ŝerce uzis la vorton "dilo" por indiki homojn kiuj uzas la vortojn "krokoDILI" kaj "Kroko". Sed post la publikigo mi serĉis en la brita(!) Chambers-vortaro la ekzaktajn signifon kaj uzadon. Kaj ho veh ! Tiu figura uzo de la vorto "dill" tute ne ekzistas en la brita lingvo. Kaj en tiu vortaro mi trovis, ke en Centralio kaj Norstralia "dill" kelkfoje uzatas kun la malvaloriga signifo de "needukita aŭstralo (indiĝeno)". Sed mia nepo diras, ke "You dill !" estas uzata en Melburno, sed nerilatante al indiĝenoj. Cetere mi ne bezonas uzi tiun esprimon, ĉar mi neniam volas mallaŭdi aŭ kritiki personojn ĉirkaŭ mi. Mi nur atentigas ilian misuzon de Esperanto, kelkfoje. **Marcel.**



## INFINITIVAJ GRAMATIKAJ OBJEKTOJ.

Infinitivo regule, sed ne ofte, uzatas kiel la kerno de Gramatika Subjekto, ekz. "MANĜI nun allogas min". Ĝi uzatas ankaŭ kiel Adjekto, precipe post la prepozicio "por": "Ŝi foriris POR AĈETI panon". Tiam kelkfoje forlasatas la prepozicio: "Ŝi foriris AĈETI panon". Notu ke en la lasta frazo "aĉeti" estas akuzativa (senprepozicia) adjekto, same kiel en "Li deziras MANĜI panon, kie "manĝi" estas Gramatika Objekto, sed kvankam ambaŭ estas akuzativoj,

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

“manĝi” ne ricevas la finaĵon –n, ĉar verboj ne povas ricevi la literon –n. La infinitivo povas esti ankaŭ Predikativo: “Foriri pli malfrue estas RISKI maltrafi la vagonaron”.

Infinitivo povas ankaŭ esti KOMPLEMENTO ĉe Substantivo, sen prepozicio (epitete): “Lia kutimo MANĜI frue” aŭ kun prepozicio (suplemente): “Lia baledado SEN FARI erarojn”.

Kun la modaj helpverboj la infinitivo estas verba parto de la ne-predikativa Predikato: “Ŝi volas RETROIRI al Francujo”.

Fine la Infinitivo povas esti la GRAMATIKA OBJEKTO de la frazo: “Ŝi deziras LEGI tiun libron”, en kiu kazo oni povas same bone uzi ado-substantivon anstataŭe: “Ŝi deziras la LEGADON de tiu libro”.

Jen kelkaj pliaj ekzemploj de la Infinitivo kiel Gramatika Objekto:

“Mi preferas LEGI la ĵurnalon” = Mi preferas la legadon de la ĵurnalo.

“Ni decidis RESTI hejme” = Ni decidis la restadon hejme. (= “Ni decidis hejmresti”).

“Ili kapablis SAVI la infanon” = Ili kapablis la savon de la infano.

“Li promesis LUDI kun ni” = Li promesis la ludadon kun ni.

“Oni ne proponis PETI monon” = Oni ne proponis la petadon de mono. (= “...MONPETI”).

“Ni petas ne FUMI ĉi tie”. = Ni petas nefumadon. (= “Ni petas ĉitiean nefumadon”).

“Ni elektos resti hejme” = Ni elektos la restadon hejme. (= “Ni elektos hejmresti”).

“Mi finas nun LABORI en la ĝardeno.” = Mi finas nun la laboradon. (= “... la ĝardenlaboron”).

“Ni komencu RESPONDI la leterojn” = Ni komencu la respondadon ante al la leteroj.

“Se li, mi konsilus retroiri al Usono” = Se li, mi konsilus la retroiradon al Usono.

“Ŝi promesis RETRODONI la libron” = Ŝi promesis la retrodonon de la libro.

“Neniu sukcesis NAĜI tiom longe” = Neniu sukcesis la tiom longan naĝon.

“Mi ĝojas RETROVENI hejmen” = Mi ĝojas la retrovenon hejman. (= “la hejmretrovenon”).

“Mi antaŭvidas VOJAĜI al Aŭklando” = Mi antaŭvidas la alaŭklandan vojaĝadon.

“Mi bedaŭras VENI malfrue” = Mi bedaŭras la malfruan venon.

“Ne penu KONVINKI min” = Ne penu mian konvinkadon. (= “Ne penu konvinkadon ante min”).

“Ne forgesu LAVI ciajn manojn” = Ne forgesu la lavadon de ciaj manoj (= “..... manlavi”).

“Ŝi prokrastos respondi al la letero” = Ŝi prokrastos la respondadon al la letero.

La dua alternativo povas esti pli bonstila ol la unua alternativo, sed ne pli bonstila ol la unua el la du aŭ tri ebloj. **Marcel Leereveld.**



## Kialo kaj Tialo

### Neologismoj

Marcel demandis (AE 446) kiun difinon de *neologismo* mi uzis (AE 445). Tiu estas bona demando, ĉar diversaj difinoj ekzistas. Mi rekomendas, ke interesitoj legu la artikolon pri *neologismo* en la esperanta Vikipedio: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Neologismo> Ĝi informas:

*Laŭ Zamenhof, "neologismoj" estas nur radikoj sinonimaj al oficialaj radikoj. Zamenhof distingis inter "nova vorto" kaj "neologismo": Laŭ li, ne ĉiu "nova vorto" jam estas "neologismo"...*

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

Resume laŭ la Zamenhofa termina distingo:

- "Novajn vortojn" rajtas enkonduki ĉiu esperantisto;
- "neologismojn", t.e. sinonimoj de Fundamentaj aŭ oficialaj vortoj, rajtas enkonduki nur la Akademio de Esperanto, per Oficiala Aldono al la Fundamento.
- Escepto: neologismoj, kiuj estas internaciaj vortoj laŭ regulo 15 de la Fundamenta Gramatiko, ne bezonas enkondukon per Oficiala Aldono.

Inter la ekzemploj en tiu artikolo, estas la jena:

**Far** (de iuj proponata prepozicio por *fare de*) kredeble estas neologismo en malvasta Zamenhofa senco, ĉar **far** estas sinonimo al *fare de*, kiu entenas nur unu leksikan radikon (*far'*; Fundamenta).

Mi ĝenerale uzas la difinon de Kálmán Kalocsay el la Enciklopedio de Esperanto de 1934:  
*Neologismo estas nomata ĉiu vorto neoficiala, ĝis sia oficialiĝo.*

Mi komprenas, ke oficiala vorto konsistas el la ortografio de la vorto kaj la signifo de la vorto. Se iu uzas la ortografion de oficiala vorto por alia signifo, ĝi ne estas oficiala, do logike ĝi estas neologismo. Tial *far* estas neologismo ankaŭ en la senco de la difino de Kalocsay.

Alia punkto estas, ke oni povas derivi novajn vortojn el la oficialaj radikoj. Tamen, mi supozas ke tiaj derivitaj vortoj devas havi signifon kongrua kun tiu de la radiko. Plue, PIV ne markas tiajn vortojn oficialaj. Ekzemple, *kial* estas oficiala (kun ĉiuj aliaj tabelvortoj), sed *kialo* ne. Kiam Marcel uzas la oficialan vorton *kial*, li ŝanĝas la oficialan signifon kaj uzon, do tio estas neologismo, laŭ la difino de Kalocsay, kaj laŭ la difino de Zamenhof.

Donald Rogers



## Grejzono antaŭ 40 jaroj kaj post 2 semajnoj

Mi unue vizitis Grejzonon en 1974 aŭ 1975, kiam mi havis proksimume 24 jarojn. En la skota Esperanto-revuo mi legis artikolon pri Grejzono: pri la kursoj kaj aliaj agadoj, sed ankaŭ pri la kastelo mem. Mi tuj pensis, ke estante sola (ĉar miaj gepatroj estis en Israelo) kaj sen aliaj devoj, mi povos viziti tiun mirindan kastelon dum mia somera ferio. Tio estis por mi aŭdaca, iom timiga kaj samtempe ekscita ideo. Mi apenaŭ ĝis tiam ĉeestis Esperanto-kunvenon eksterlande, sed fakte mi apenaŭ entute tiutempe estis vojaĝinta eksterlanden, kaj certe neniam sola.



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

Por miaj malmultaj antaŭaj vizitoj en eksterlandon, estis miaj gepatroj kiuj organizis ĉiujn detalojn de la vojaĝo. Sed nun mi iel devis mem malkovri kiel atingi la urbon Baugé – kompreneble tiutempe ne ekzistis Interreto, internaciaj telefonvokoj estis tre multekostaj, kaj necesis aranĝi ĉion letere. Finfine mi ja faris tiun grandiozan vojaĝon, per ŝipo al Kalezo, per trajno al Parizo, tiam per alia trajno al Le Mans, per aŭtobuso al Baugé, kaj finfine portante mian dorsosakon mi marŝis al la kastelo.

Kaj tie mi restis dum du semajnoj, ĝuante la sperton la unuan fojon en mia vivo paroli nur en Esperanto. Mi partoprenis en la mezgrada kurso (bedaŭrinde post tiom da jaroj mi ne plu memoras la nomon de la instruisto), amikiĝis kun francaj junulinoj de mia aĝo, kaj ĉeestis ekskurson al la antikva apoteko en la urbo. Mi memoras, ke ni spektis la filmon *Angoroj*, sed kiel nova esperantisto mi ne plene komprenis la tekston, tamen sufiĉe por sekvi la rakonton. Mi malklare memoras ankaŭ prelegeton pri Schwarz kun legado de kelkaj el liaj amuzaj poemoj, kiujn mi ja povis kompreni kaj ĝui.


La kondiĉoj en la sepdekaj jaroj estis relative primitivaj. Mi restis en ses- aŭ ok-lita ĉambro – kompreneble kiel junulo mi elektis la plej malmultekostan eblecon. Mankis varma akvo en la ĉambroj, kaj necesis alporti ĝin en kruĉoj de lavkuveto en la koridoro. Aliflanke mi aparte ĝuis la bongustajn francstilajn manĝojn.

Mi eĉ ne imagis tiutempe, ke iam mi mem verkos artikolojn kaj eĉ librojn en Esperanto, ke mi havos Esperantlingvan familion, kaj certe ne, ke mi iam mem fariĝos instruistino en Grezijono.

Kaj nun ni venas al la kerno de ĉi tiu longa enkonduko. En la lasta semajno de oktobro (t.e. post du semajnoj) estos la aŭtuna renkontiĝo en Grezijono. Mi mem instruos kurson pri literaturo, en kiu ni legos eltiraĵojn el pluraj verkoj gravaj en la historio de Esperanto, mem verkos mallongajn rakontetojn, aktoros scenon el teatraĵo, kaj ekzerciĝos pri kelkaj tiklaj gramatikaj demandoj. Krome mi prelegos du-tri fojojn.

Sed kompreneble ne nur mi instruos dum tiu semajno: fakte estos amaso da konataj nomoj. Murast Özdizdar el Turkujo instruos la komencantojn, Xavier Godivier instruos la progresantojn, kaj krome tiom da aliaj konataj esperantistoj prelegos aŭ organizos agadojn, ke mi vere ne povas listigi ĉiujn ĉi tie. Estos ankaŭ multaj agadoj taŭgaj por infanoj kaj adoleskuloj, precipe rilate al Haloveno. Vi povos mem legi la detalojn ĉe: [eventaservo.org/eventoj/M0RxSj8RwReVpr5W/](http://eventaservo.org/eventoj/M0RxSj8RwReVpr5W/) aŭ rekte en: [gresillon.org/a](http://gresillon.org/a).

Do mi esperas, ke multaj esperantistoj partoprenos en tiu interesa semajno, kun propra ĉambro, varma akvo, kaj ĉio, kio mankis antaŭ 45 jaroj!



Anna Lowenstein



Reklamu viajn klubkunvenojn Sendu la informon al [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au) AE kaj la mondo atendas viajn raportojn



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

# Ĉi jara River Lights Festivalo Maitland



Kelkajn fotojn sendis Alan Turvey



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

## Ekskurso al Warrnambool

La 12an de oktobro 2019 grupo da melburnaj esperantistoj frumatene trafis la trajnon al Warrnambool kun la celo tie renkonti Cornelio Dos Santos Verdial, esperantisto el Orienta Timoro kiu venis al Australio kadre de interhelpo inter Orienta Timoro kaj Australio. Dum tri jaroj 25 timoranoj laboros kaj studos pri kiel trakti viandon por ĝin eksporti al aliaj landoj. Ili ricevis loĝejon en la universitato Deakin en Warrnambool. Al Cornelio instruis Esperanton Heidi Goes dum sia restado en Orienta Timoro. Do ni esperas ke ni ree havos la plezuron lin renkonti en Melburno au en alia loko.



Foto: de la maldekstro al la dekstro Cornelio, Franciska, Heather, Joanne kaj Petro  
Raportis **Franciska Toubale**



**3zzz** En la elsendo de la 14a de oktobro eblas audi Xavier Alcade, kiu raportas pri la historio de la nekredeble bela kongresejo dum la SAT kongreso en Barcelono en aŭgusto 2019 kaj ekscii pri la malfacilaĵoj por recenzi verkojn.

Ne forgesu ke la radiotono finiĝos la 21an de oktobro. Se vi intencas donaci por la Esperanto programo, kontaktu Heather je la adreso

[erikino.48@gmail.com](mailto:erikino.48@gmail.com) Mi antaŭdankas vin pro via kontribuo

**Franciska Toubale**

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***